# Protokolo de estrara interkonsiliĝo la 18-an de aŭgusto 2016 je 19.30h per Skajpo.

Partoprenantoj: Mario Machlik, Anne Karin Bondhus, Ulf Lunde, Amelie Matt,
Herman Ranes.

**0. Tagordo**

Aprobita.

**1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo, la 23-an de majo**

Aprobita.

**2. Ekonomio**

Skagen Vekst: 51 118 kr (48 734 kr).
Skagen høyrente 129 520 kr (128 907 kr).

**3. Raporto pri la UK**

Herman Ranes raportis mallonge de la 101ª Universala Kongreso, kiu okazis en Nitro kun pli ol 1200 partoprenantoj. De Norvegio aliĝis 14 esperantistoj.

**4. Seminario**

Mario skribis al la germana matematikisto kaj Esperanto-aktivulo Lu Wunsch-Rolshoven (LWR), invitante lin prelegi pri iu temo laŭ sia propra elekto. Mario proponas eventuale demandi al Stefan MacGill aŭ István Ertl se LWR ne povas, kaj ni estas ankoraŭ malfermaj al eventualaj aliaj ideoj.

La seminario okazu aŭ la lastan semajnfinon en oktobro aŭ la unuan semajnfinon en novembro.

**5. Landa kunveno 2017**

La 2ª ĝis la 4ª de junio estas proponita kiel datoj por la kongreso.
Venontjare ni ne malfruiĝu pri la publikigado de jarraportoj/-kalkuloj aŭ de kunvoko al LK.

**6. Mortis Karl Johan Grønning**

La entombigo jam okazis. La NEL-membroj Otto Prytz kaj Pilar Menendez partoprenis la funebran ceremonion.

Grønning estis membro de la Ekzamena Komisiono de NEL. (Sed eble ne necesas elekti novan membron antaŭ la LK 2017.) Okaze de la funebro, la komisiono donacis 200 kronojn al *Hospice Stabekk* memore al Karl Johan Grønning.

**7. Eventualaĵoj**

1. Kalendaro pri ontaj estrarkunvenoj

   La estraro proponas la jenajn datojn:
   ĵaŭdo 08.09.2016
   ĵaŭdo 13.10.2016
   ĵaŭdo 10.11.2016
   ĵaŭdo 08.12.2016 se bezonatas

2. Mario veturos (aviadile) al Oslo kaj la 22$^{an}$ de aŭgusto vizitos Esperantonia.

La interkonsiliĝo daŭris de 1930h ĝis 2035.

La dato por la venonta interkonsiliĝo: la 8$^{a}$ de septembro.